
# *Usona registaro subtenas la malpermeson de familioj sendi monhelpojn al Kubo*




**Bildo: Granma**

Havano, nov 9 (RHK) Kadre de sia malamika politiko al Kubo, la usona registaro malhelpas la normalan fluon de monsenda?oj de tiu nacio al la Grandaj Antiloj.

La usona registaro anoncis, ke la malpermeso de  monsendoj  al Kubo restos valida por pli longa tempo, tiel malhelpante la rajton de familioj helpi siajn amatojn.

La celo estas certigi, kiel ili argumentas, ke la profitoj iru rekte al la kuba popolo, io never?ajna, kiam ili ankora? subtenas la kriman ekonomian, komercan kaj financan blokadon, kiu sufokis la lo?antojn de la

kariba lando dum ses jardekoj, e?  meze de la pandemio de Kovim-19.

La? la agentejo Prensa Latina, ?i tiu teorio ripetita de politikistoj de la norda nacio ?esigis la rilatojn de la kompanio Western Union kun la kubaj financaj institucioj komisiitaj pri prilaborado de monsenda?oj, specife Fincimex, en oktobro 2020.

La decido, trudita de la eksprezidento Donald Trump (2017-2021) kaj subtenita de la nuna administracio, unuflanke ?esigis la monfluon inter la du landoj per regulaj kaj instituciaj kanaloj, surbaze de tute senbazaj pretekstoj.

Fonto:  Granma

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/276533-usona-registaro-subtenas-la-malpermeson-de-familioj-sendi-monhelpojn-al-kubo

Radio Habana Cuba